



Svisa Esperanto-Societo

informas

jaro 2005, numero 3-a: junio / septembro
kun informoj pri renkontoj ekde la 15-a de septembro



Foto Monika Molnar

Partoprenantoj al la studsabato de la 19-a de februaro, kiu inaŭguris la ĵus instalitan novan salonon de CDELI.

Rememorigilo

SES informas

Redakcio:

Claude Gacond, Poŝtfako 3034,
CDELI, Biblioteko de la Urbo,
2303 La Chaux-de-Fonds.

Retpoŝto: claude.gacond@ne.ch

Tel.: ĉe CDELI: 032 967 68 55,
hejme: 032 926 52 32

Fakso: ĉe CDELI: 032 967 68 29:
indiki: por Claude Gacond

Redaktaj kunlaborantoj:
Rolf Ernst, Nancy Fontannaz, Andy
Künzli, Richard Schneller.

SES informas

Redaktaj datlimoj

2005-4: oktobro: septembre 15. Mencio de informoj ekde la 15-a de oktobro.

2005-5: novembro-decembro: oktobre 15. Mencio de informoj ekde la 15-a de novembro.

2006-1: januaro-februaro : decembre 15. Mencio de informoj ekde la 15-a de januaro.

2006-2 : marto-majo : februare 15. Mencio de informoj ekde la 15-a de marto.

2006-3 : junio-aŭgusto : majo 15. Mencio de informoj ekde la 15-a de junio.

SES-estraro

Bruno Graf, prezidanto, Jurastrasse 23,
3063 Ittigen/Bern. Tel.: 031 921 44 59.
Retpoŝto: bgraf.o@bluewin.ch

Dietrich Weidmann, vicprezidanto,
PF 301, 8034 Zürich. Tel.: 044 251 50 25.
Retpoŝto: info@esperanto.ch

Mireille Grosjean, vic-prezidanto, Grand-
Rue 9, 2416 Les Brenets. Tel.: 032 932 18
88. Retpoŝto: mireille.grosjean@rpn.ch

Nicole Margot, sekretario, Chemin des Lys
4, 1010 Lausanne. Tel.: 021 653 14 67.
Retpoŝto: n.margot@bluewin.ch

Hans-Werner Grossmann, kasisto,
Esperanto-Servo, PF 262, 4132 Muttenz 1.
Tel.: 076 460 8992. Retpoŝto: esperanto-servo@bluewin.ch

Poŝta ĉekokonto

17-581908-4

Svisa Esperanto-Societo 2300 La Chaux-de-Fonds

Kotizoj al SES

kun ricevado de *SES informas*.

fr.10	Infanoj	Ĝis 18 jaroj
fr. 20	Junuloj	de 19 ĝis 29 jaroj
fr. 35	Plenkreskuloj	ekde 30 jaroj
fr. 50	Paroj	"
fr. 70	Patronoj	"
fr. 25	nura abono al	<i>SES informas</i>



Svisa kalendaro

Septembre

- 15: Redakta datlimo de SES informas.
22 : Basel : Invito ĉe Nicole Bérout.

Oktobre

- 3: Lausanne: LES: Kunveno.
4 : Genève : Diskutado pri kongresoj.
5: Luzern: LES: Universala Kongreso.
15 : Lausanne: Regiona tago de SES.
15: Redakta datlimo de SES informas.
27: Basel: ESB: Ĉiu rakontas pri siaj ferioj.

Novembre

- 1 : Genève : Kun Claude Gacond pri H. Hodler
2: Luzern: LES: Konversacia rondo.
5: Chaux-de-Fonds: CDELI: Kultura seminario.
7: Lausanne: LES: Kunveno.
9: Chaux-de-Fonds: Neŭŝatela grup-vespero.
15: Redakta datlimo de SES informas.
19: Chaux-de-Fonds: CDELI: Didaktika sabato.
23: Chaux-de-Fonds: Neŭŝatela grup-vespero.
24: Basel: ESB: Programo 2006.

Decembre

- 3: Chaux-de-Fonds: CDELI: Kultura seminario.
6: Genève: Monata kunveno.
7: Luzern: LES: Zamenhof kaj programo 2006.
10: Basel: ESB: Zamenhofa festo, ESB 100-jara.
11 : Lausanne : Zamenhofa Festo.
14: Chaux-de-Fonds: Neŭŝatela zamenhofa festo.
15: Redakta datlimo de SES informas.

2006 Januare

- 3: Chaux-de-Fonds: CDELI: Kultura seminario.
4 : Luzern: Konversacia rondo.
11: Chaux-de-Fonds: Neŭŝatela grup-vespero.
21: Chaux-de-Fonds: CDELI: Didaktika sabato.

- 25: Chaux-de-Fonds: Neŭŝatela grup-vespero.

Februare

- 4: Chaux-de-Fonds: CDELI: Kultura seminario.
6 : Lausanne: Ĝenerala Asembleo.
8: Chaux-de-Fonds: Neŭŝatela grup-vespero.
15: Redakta datlimo de SES informas.
18: Chaux-de-Fonds: CDELI: Didaktika sabato.
22: Chaux-de-Fonds: Neŭŝatela grup-vespero.

Marte

- 4: Chaux-de-Fonds: CDELI: Kultura seminario.
8: Chaux-de-Fonds: Neŭŝatela grup-vespero.
18: Chaux-de-Fonds: CDELI: Didaktika sabato.
22: Chaux-de-Fonds: Neŭŝatela grup-vespero.

Aprile

- 1: Chaux-de-Fonds: CDELI: Kultura seminario.

Maje

- 6: Chaux-de-Fonds: Ĝenerala Kunveno de SES & 50-jara jubileo de CDELI.
10: Chaux-de-Fonds: Neŭŝatela grup-vespero.
15: Redakta datlimo de SES informas.
20: Chaux-de-Fonds: CDELI: Didaktika sabato.

Junie

- 14: Chaux-de-Fonds: Neŭŝatela grup-vespero.
17: Chaux-de-Fonds: CDELI: Didaktika sabato.

Aŭguste

- 15: Redakta datlimo de SES informas.

-oOo-


Vivo de SES

Regiona Tago de SES en Romandio
Sabate la 15-an de oktobro 2005

Laŭzano

Picejo *Le Milan*, bulvaro Grancy, 54

La picejo *Le Milan* situas je la kruciĝo de la bulvaro Grancy kun la avenuo Fraisse, sudokcidente de la stacidomo. Vi povas, ĉu eliri sude de la stacidomo kaj longiri okcidenten ĝis avenuo Fraisse, kaj plu iri kelkajn metrojn suden, ĉu eliri norde de la stacidomo kaj piediri okcidenten ĝis avenuo Fraisse (sub la fervojo) kaj malsupreniri ĝis bulvaro Grancy.



Programo

Matene:

- 10h Alveno, akcepto kaj kafumado, mendo de tagmanĝo, pago de la partopren-kotizo (CHF 10.-).

- 10h 30 Debato gvidata de **Bruno Graf**, prezidanto de SES: kiel prezenti esperanton dum la angla jam iĝis "lingua franca" (ĉies lingvo)? Post enkonduko, diskutoj okazos en diversaj grupoj.

- 12h 30 Tagmanĝo: je alveno eblas mendi surloke italajn specialaĵojn laŭ diversaj prezoj.

Postagmeze:

Temo: Ekologio

Unua preleganto: **Dro Manfred Westermayer**, kemiisto, prezidanto de la Asocio por Verduloj Esperantistaj, el Germanio.

- 14 h Rilatoj inter esperantistoj kaj verduloj, aŭ kiel rilati kun politikaj partioj.*

- 15 h 30 **Agenda 21**, agadprogramo por la 21a jarcento, orientita al respektama disvolviĝo kaj adoptita de la ŝtatoj subskribintaj la Deklaracion de Rio de Janeiro en junio 1992.*

- 16h 30 paŭzo

Dua preleganto: **Alain Favre**.

- 17 h Ĉu ekzistas prilingva ekologio?*

* La tri prelegoj estos sekvataj de diskutoj

Komuna vespermanĝo povos esti planita surloke kun interesatoj.

Dimanĉe la 16an de oktobro:

Al la partoprenantoj, kiuj dezirus daŭrigi sian restadon en Laŭzano dimanĉe, ni proponas turisman programon:

Vizito de la mezepoka vaŭda urbeto *Moudon* (norde de Laŭzano).

Vojaĝo per aŭtobuso: foriro el la bushaltejo Tunnel je la 10h 09, alveno en *Moudon* 10h 53. Promenado tra la urbeto, pikniko aŭ manĝo en restoracio, vizito de la historia muzeo kaj de la muzeo *Eugène*

Burnand, vaŭda pentristo (1850-1821). Eventuala promenado en la apuda arbaro. Reveno: 18h 02 el *Moudon*, 18h 44 alveno en Laŭzano (aŭ laŭplaĉe, ekzistas busoj ĉiuhore dum la tago, kaj eĉ trajnoj).

Nur se la vetero ege malbonos, ni prefere vizitos laŭzanajn muzeojn.

Aliĝoj

Aliĝoj ĝis la 10-a de oktobro:

al Nicole Margot, ch. des Lys 4, CH-1010 Lausanne,

tel: 0021 653.14.67, <n.margot@bluewin.ch>.

Via aliĝo necesas por taksi la nombron de partoprenantoj, sed la kotizon vi pagos surloke. Bonvolu menciigi ĉu vi ankaŭ partoprenos la dimanĉan programon. La organizantoj ne zorgas pri rezervoj de hotelo.

Nicole Margot, antaŭĝoja renkonti vin.

-oOo-

Protokolo de la Ĝenerala Kunveno de Svisa Esperanto-Societo Zuriko, la 16-an de aprilo 2005

10h30: 20 voĉdonrajtaj membroj ĉeestas la kunvenon.

1. komunikoj de la prezidanto.

La prezidanto, Bruno Graf, konstatas, ke malmultaj membroj ĉeestas, ĉu pro la matena horo, ĉu pro la longa vojaĝo necesa, ĉefe por romandoj. Li dankas la familion Weidmann pro ties

simpatia akcepto en bela esperant-ejo, ankaŭ kunvenejo de Zurika Esperanto-Societo (ESZ).

Dietrich Weidmann bonvenigas la ĉeestantojn kaj donas organizajn informojn. Li deziras sukcesan Ĝeneralan Kunvenon de SES. Aperitivon oferis ESZ.

Bruno Graf anoncas du

surprizojn: posttagmeze venos la nova ĉef-redaktoro de *Esperanto-Aktuell*, revuo de Germana Esperanto-Asocio (GEA), s-ro Alfred Schubert kaj ĵurnalisto de radio DSR. Li klarigas, ke la programo de tiu SES-tago en Zuriko alvenis malfrue pere de SES-informas pro superŝutiteco de la redaktoro Claude Gacond. Ne estas rimarkoj pri la tagordo, kiu estas unuanime akceptita.

Senkulpiĝoj:

Gesinjoroj Laurent Burgbacher, Lucienne Dovat, Alain Favre, Claude Gacond, Ernst Glättli, Jean-Jaques Lavanchy, Andreas Künzli, Koni Rey.

Forpasintoj:

Ni observas unuminutan silenton honore al la membroj, kiuj forpasis dum la jaro:

- Sinjorino Anne-Marie Briner el Ĝenevo.
- Sinjorino Gisèle Weil el Genève.
- Sinjoro Marcel Moreillon el Genève.
- Sinjoro Ernst von May el Oberuzwil, longjara kasisto de SES.
- Sinjoro Rudolph Schneller.
- Sinjorino Madeleine Stakian el Genève, honora membro de SES, kiu longe redaktis la bultenon *La Brasikfolion* kaj prezidis la ĝenevan societeton *La Stelo*. Ŝi estis sekretariino de UEA, kiam Hans-

Jakob oficis. Ŝi verkis poemojn kaj tradukis parolojn de kantoj sub la pseŭdonomo de Mad Mevo (vidu *SES-informas* n-ojn 1 kaj 2).

- Sinjorino Erna Eugster el Thal.

2. Elekto de voĉnombranto:

Paul Scherer.

3. Protokolo de la lastjara kunveno:

Unuanime akceptita.

4. Jarraporto 2004, jarkalkulo, bilanco, raporto de la revizoroj:

Jarraporto 2004, aperinta en *SES-informas* 2005-1. Ĉefa punkto: stabileco de la membraro malgraŭ la mortintoj. La membraro ĝuas pri interesa bulteno, pri kiu ni devas danki nian ĉef-redaktoron Claude Gacond. Ekzistas bona kunlaboro en tuta teamo de kunredaktantoj kaj kunsendantoj.

La junularo stagnas, la aktivuloj Benno Frauchiger kaj Laurent Burgbacher atingas la aĝlimon por plu aktivi en JES (Junulara Esperanta Societo). Ni dankas la kasiston, Hans-Werner Grossmann kaj Mireille Grosjean, kiu regule informas la gazetaron.

Jarkalkulo, bilanco, aperintaj en *SES-informas* 2005-1. La financa stato estas bona dank'al heredaĵo de Charlotte Ecklin el Lucerno, kio produktas fakte "falsan pluson".

Tiun jaron ni denove buĝetas

sumon por redaktado de programita kurso germanlingva: CHF 2500.00 je punkto 3240, ne realigita lastjare.

Ni miras pri la multaj donacoj kaj dankas pro ili. Ni havis 14 patronojn, kiuj pagas duoblan kotizon, kaj 70 donacintojn. Nia ĉefa mono ne plu troviĝas ĉe Crédit Suisse, sed ĉe Wir-Banko kun interezoj pli altaj, laŭ la konsilo de nia vic-prezidanto Dietrich Weidmann. Tiu banko estis fondita de esperantisto antaŭ 70 jaroj.

Restas mono de Agado 2003, kiu utilos por la kostoj de la Svisa Enciklopedio. SES pagos la ekzemplerojn, kiuj iros al publikaj bibliotekoj. SES ankaŭ proponos rabaton al la membroj de SES, kiuj aĉetos tiun enciklopedion. Sed pri tiu enciklopedio ni atendas pli detalajn informojn de Claude Gacond. Andreas Künzli antaŭvidas ties presadon en aŭtuno. Ni serĉas ankoraŭ financajn subtenojn de firmaoj.

Christiane Sixtus-Pot kaj Dieter Rooke reviziis la kontojn kaj Christiane Sixtus Pot legas la raporton, kiu aperis en *SES-informas* 2005-2.

La jarraporto, la jarkalkulo, la bilanco kaj la revizora raporto estas unuanime akceptitaj.

5. Agado kaj buĝeto 2005:

Aperis en *SES-informas* 2005-1.

Komentoj pri kelkaj punktoj:

1. Aktualigi la retejon, nia plej bona vizitkarto, kiu kreas multajn kontaktojn. Bruno Graf miras pri la bunteco de la retejo zorgita de Dietrich Weidmann, sed ĝi ne plu aktualas. Jam la enirpaĝo estis ĵus modernigita. Rolf Ernst kunlaboras. Dietrich Weidmann raportas: po 5-10 informpetoj alvenas ĉiun semajnon. Li observis, ke la svisa kalendaro ne funkciis ankaŭ ĉar la homoj ne sendas la informojn. Li ŝatus malcentran solvon, SES centre redaktu nur la ĉefan paĝon kun ligiloj al la adresoj de ĉiuj societoj, kiuj mem zorgu sian paĝon.

Sonia Brun anoncas, ke la lucerna societo pretus finance subteni la aktualigon de la reta paĝo dungante studenton por tiu tasko. Dietrich Weidmann asertas, ke la centra paĝo apartenas al lia firmao, ke li dungas profesiulon por ĝin zorgi.

6. Subteni lokajn grupojn. SES pli kaj pli finance helpis, ĉefe Laŭzanon kaj Ĝenevon.

8. Pri la Svisa Enciklopedio Andreas Künzli informis, ke li devas ankoraŭ fari la kovrilpaĝon kaj ĝi povos iri al la presejo dum la vintro. Claude Gacond pretas finance helpi la enciklopedion.

Germana Esperanto-Junularo presis 100.000 informslipetojn por disdoni al junuloj dum la somero. Ni mendis 1000 el ili.

Buĝeto kaj Agado 2005 unu-anime akceptitaj.

6. Honorigo de membroj:

La estraro proponas elekti Erna Döring el Bazelo kaj Lucienne Dovat el Lausanne kiel honorajn membrojn. Nicole Bérout prezentas Erna Döring kaj Nicole Margot prezentas Lucienne Dovat (La koncernaj tekstoj sekvas la protokolon) Aprobo per aplaŭdo. Erna Döring ĝojas kaj dankas pro sia honorigo. Lucienne Dovat senkulpiĝis.

7. Diversaĵoj:

La lucerna societo proponas krei sur la reto fakterminaron pri plej uzataj mallongigoj. Dietrich Weidmann jam posedas liston de diversaj sigloj. Li estru retan liston pri kolekto de sigloj.

Mireille Grosjean raportas pri:

- la ĉeesto de esperantista stando en la librofoiro de Ĝenevo.
- la kongreso de la esperanta asocio de Rhône-Alpes en Bourg-En-Bresse, kiu okazis paske.
- sesio de internaciaj ekzamenoj ILEI-UEA, kiu okazos en Homburgo (Saarlando) venontan decembron.
- dosieroj al la ĵurnalistoj.

La kunveno estas fermita je la

12h 55.

Nicole Margot kaj Bruno Graf.
Karaj samideanoj,

Erna Döring

Honora membro de SES

Erna Döring naskiĝis en Bazelo la 13-an de majo 1920. Ŝia patro estis germana, ŝia patrino svisa.

En februaro 1921 la familio translokiĝis al Dresden. Tiam la patrino fariĝis esperantistino. Ŝi ofte havis gastojn kaj Erna rajtis vekti ilin en esperanto. Tial ŝi renkontiĝis kun infanoj, kiuj ankaŭ parolis tiun lingvon kaj nature ŝi deziris lerni ĝin. En 1926 ŝi rajtis partopreni kurson.

En 1929, pro malsano de la avo, kiu havis entreprenon en Bazelo, la familio neatendite revenis al Bazelo. Tiam kontakto kun esperanto ne tuj okazis, sed Erna ĉiam anoncis, ke kiam ŝi estos plenkreska, tiam ŝi relernos tiun lingvon. Ŝi iris al la lernejo kaj poste laboris en diversaj metioj.

Tamen en 1966 ŝia patrino legis anoncon pri la tiama Esperanto-Grupo kaj Erna kontaktis ĝin. Tiel ŝi konatiĝis kun Kurt kaj Hildegard Schweizer, Hermann kaj Jeanne Schmutz, Heinrich Ringli kaj Hans-Werner Grossmann. Dank'al korespondado ŝi rapide lernis. Jam du jarojn poste ŝi fariĝis sekretari-

ino de la grupo. Tiam ŝi partoprenis fervojistan kongreson kaj ekde 1982 SAT-kongresojn.

En 1976 ŝi transprenis la gvidon de la bazela Esperanto-Grupo kaj ankaŭ fariĝis esperanto-instruanto. Ŝi esence kontribuis al la firmigo de la esperanto-movado en Bazelo.

En 1975 ŝi transprenis la tajpadon kaj administradon de *La Migranto*. Okaze de jarkunveno de TANEF en 1976 ŝi estis elektita kiel internacia-fakreferanto kaj proponita al la Naturamika Internacio, kie ŝi dum la sekva jara kunveno estis agnoskita kiel internacia fakreferanto por esperanto. Dum tiu tempo 1976-1996 ŝi ankaŭ kunlaboris al la pretigo de butonoj por vestaĵoj, de gluinsignoj por aŭtomobiloj, de T-ĉemizoj, ktp. Kaj ŝi estis LKK-kunlaboranto de la 64-a UK en Lucerno en 1979.

Erna Döring fondis la TANEF-grupon en Bazelo, organizis ekskursojn, feriajn semajnojn kaj unu foje jare tutsvisan migradon.

En 1981 ŝi organizis la SAT-Kongreson en Bazelo kun David Bühlmann, Maŭro de Sassi, Alice Kessler kaj Jimmy Rivière. Sekvis postkongresa semajno en Lucerno.

En 1981 ŝi fondis kaj ĝis 1989 redaktoris la kluban organon *Kuriero de Esperanto*. Sindone ŝi organizis multajn esperanto-aranĝojn lokajn, naciajn, trilandajn kaj internaciajn.

En 1982 ŝi emeritiĝis de la medicina eldonejo, kie ŝi laboris. Pro la centjariĝo de esperanto en 1987, kunlabore kun KCE, ŝi aranĝis ekspozicion pri Esperanto kaj interlingvistiko en Svislando en la bazela universitata biblioteko.

Kiel vi konstatas, multe da aktivecoj poresperantaj en Svislando kaj en eksterlando ni ŝuldas al Erna Döring.

Ni kore dankas al ŝi pro ŝia granda laboro por nia movado, en Bazelo, en Svislando sed ankaŭ mondscale.

Ankoraŭ nun ŝi estas peranto de SAT kaj de TANEF kaj kunredaktoro de *La Migranto* kaj de *Sudrejna Kuriero*, kiu anstataŭis la lokan bultenon *Kuriero de Esperanto*.

Nicole Bérout

Lucienne Dovat

Honora membro de SES

Antaŭ kelkaj monatoj Andreas Künzli, aŭtoro de la aperonta Svisa Enciklopedio, sendis al kelkaj membroj de Laŭzana Esperanto-Societo skizon de ĉapitro pri ties historio, por ke ni ĝin superrigardu. Konsiderante tiun historian panoramon kun multaj nomoj de aktivuloj en la laŭzana societo, io frapis min: de pli ol 40 jaroj mi estas esperantistino, kaj mi ĉiam vidis Lucienne Dovat aktiva en nia

movado.

Kvankam ŝi neniam akceptis estraran rolon, Lucienne ne ĉesis instrui ekde sia esperantiĝo kaj daŭre havis fortan influon en la societo. Ĉar ŝi ĉion faras serioze, ŝi estas referenco pri korekta lingvaĵo, kaj daŭre havas stabiligan rolon en nia societo.

Mi iom troigas, ĉar kompreneble Lucienne ne tuj instruis, kiam ŝi esperantiĝis, en 1955, antaŭ 50 jaroj. Ŝia unua kontakto kun la lingvo okazis, kiam ŝi hazarde ekhavis la tiaman lernolibron de SAT (*Cours Rationnel d'Espéranto*), en tiu tempo plena da politikaj propagandoj. La libro tuj interesis ŝin kaj ĝin ŝi eklegis.

Tamen la vera instigo al lernado okazis kelkajn jarojn poste, kadre de la movado JEAN (movado pri memprogresigo, kreita de la ĝeneva esperantisto Marc Rochbach). Lucienne bone memoras frazon de parolado de Marc Rochbach: "... estas same por esperanto, ne diru mi faros tion, kiam la aliaj faros. Se vi atendas, ke la aliaj faru, vi tion neniam faros..."

Tiam Lucienne komprenis, ke esperanton ŝi devas lerni sen atendi. Ŝi sekvis kursojn kun Paul Arbenz, kaj poste kun Hélène Weiss. Tre rapide oni instigis ŝin instrui. Ŝi atendis, ke ŝi flue parolu por ekinstrui lunde vespere ekde 1963 proksimume. Iom poste ni kunvenis

kun ŝi en laŭzana kafejo, kie ŝi forte instigis nin ne krokodili.

Poste ŝi forlasis la Popoldomon por instrui en la kuirejo de Foyer de Malley (Malley gastejo, fakte paroĥejo). En la jaro 1978 la patro de Nancy Fontannaz (ankaŭ en la movado JEAN li lernis esperanton kun Lucienne) parolis al ŝi pri la Rika Metodo, pri kio Lucienne poste fakiĝis. Tiun metodon kreis Marc Rochbach kun la unua celo malkondiĉigi la lernantojn de la gepatra lingvo. Poste Lucienne didaktike formiĝis kun Claude Gacond, kiu en tiu tempo diferencigis la kategoriojn de la vortelementoj (substantivo, verbo ktp) pere de koloroj. Lucienne miksis la tiaman metodon de Claude Gacond kun la Rika Metodo, uzante la kolorojn de Claude Gacond, kaj plu uzas ĝin en siaj grupoj de Laŭzano kaj Vevey.

Tiu metodo aparte taŭgas al demonstradoj pri esperanto. Jam 40 foje Lucienne tiel prezentis la lingvon al grupoj de sia regiono, kaj ekde kelkaj jaroj ŝi ankaŭ prezentas la lingvon al grupoj de infanoj kadre de la Feria Pasporto (dumferiaj okupoj proponitaj al infanoj). Ĉiuj infanoj entuziasmiĝas, formante frazojn pere de la Rika Metodo, kalkulante en esperanto, aŭskultante poemon de Claude Piron, spektante filmon pri Universalaj Kongresoj, kaj ĉiuj re-

iras hejmen kun elektita materialo (tekstoj, informoj pri la programita kurso, ktp).

En la gastejo de Malley, kie Lucienne longe instruis, okazis la unuaj paŝoj de Kultura Centro Esperantista, kiu ankoraŭ ne posedis domojn en La Chaux-de-Fonds. En la gastejo de Malley okazis regulaj kulturaj semajnfinoj kun cento da partoprenantoj el pluraj landoj, kursoj por komencantoj kaj por infanoj.

Kiam François Randin kreis kurson por la laŭzana televido (TVRL), tiam estis Lucienne, kiu instruis esperanton plurfoje semajne al la laŭzanananoj.

Lucienne Dovat ne nur instruis. Ekde la jaro 1966 ŝi fariĝis provlernantino de s-ro Sturznegger pri Unesteno, baptopatrino de la libro

de S-ro Sturznegger pri tiu stenografio. Lucienne korespondis internacie en Unesteno kun pluraj esperantistoj. Ŝi eĉ korespondis kun la sekretario de Konrad Adenauer, esperantisto uzanto de tiu stenografio.

Mi devas fini tiun prezenton dirante, ke Lucienne kaptas ĉiujn okazojn por informi pri esperanto, en la trajno, en la buso, en la naĝejo.

Ni deziras al Lucienne pluajn fortojn por daŭrigi sian aktivadon pri esperanto!

PS. Alia artikolo pri Lucienne Dovat jam aperis en SES-informas 2004-4.

Nicole Margot

-oOo-

Donacoj

Donacoj en frankoj ricevataj ĝis septembro :

Al SES : Sonja Béatrix-Koleva, Travers: 30; Claude Blanc, Renens: 25; David Buhlmann, Prilly: 60; Tazio Carlevaro, Bellinzona: 80; Pierre Dorthe, Lausanne: 35; Lucienne Dovat, Renens: 60; Renate Heer, Bern: 90; Jacques Henry, La Chaux-de-Fonds: 30; Jeanne Mamin, La Tour-de-Peilz: 20; Marie-Louise Münger, Môtiers:

20; Carlo Nicolodi, Allschwil: 40; Madeleine Noser-Hirter, Zürich: 5; Parzival, Bienne: 35; Claude & Nicole Piron, Gland: 50; André Sandoz, La Chaux-de-Fonds: 100; Pierre-Alain Sauser, La Chaux-de-Fonds: 15; Marguerite Viredaz, Lausanne: 20; Beat Zeuggin, Birsfelden: 10; Sieglinde Ziegler, Winterthur: 20. **Sume: 850.**

Agado 2005: Anonimulo: 25; Françoise Badoux, Lausanne: 50.

Sume: 75.

Novaj patronoj 2005

(Tiu fariĝas patro, kiu pagas duoblan jarkotizon.)

Sonia Betrix-Koleva, Travers;
Lucienne Dovat, Renens;
Jacqueline Favre, Genève; Renate
Heer, Bern; Jacques Henry, La
Chaux-de-Fonds; Samuel
Kaufmann, Kreuzlingen; Paul

Scherer, Emmenbrücke; Suzanne
Streit, Givrins.

Nome de SES la kasisto Hans-
Werner Grossmann dankas la
registritajn donacintojn pro ties
malavareco kaj antaŭdankas pro la
atento, kiun ĉiu alportos al la pag-
ilo aldonita al la nuna bulteno kaj
al la ĉisekva SOS-helpo-peto de
la prezidanto.

SOS-helpo peto

SES ricevis SOS-helpopeton de **Monika Molnar**, instruistino de la privata lernejo *La Grande Ourse* en La Chaux-de-Fonds, kiu instruas esperanton al la gelernantoj. Ili jam dufoje aktoris esperantlingve dum niaj kunvenoj.

La gelernantoj korespondas depost iom da tempo per esperanto kun klaso de Montessori-lernejo en Aŭstralio kaj tiel interkonatiĝis. La entuziasmo tiel kreskis, ke la aŭstraliaj gelernantoj deziris viziti la svisajn geamikojn. Unue oni pensis pri revo, sed la revo komencis realiĝi, kiam Aŭstralio Esperanto-Asocio promesis subvencii la flugon al Svislando.

Subite *La Grande Ourse* staris antaŭ problemo, komencis cerb-

umi kaj plani, kaj fine decidis akcepti la junajn pionirojn el Aŭstralio por restado en Svislando, kvankam mono ne disponeblas. La surprizo estas perfekta. **9 gelernantoj kaj 3 instruistinoj el Aŭstralio venos la 11-an de septembro al La Chaux-de-Fonds kaj restados ĝis la 27-a de septembro.** Ili gastos la unuan semajnon ĉe la gepatroj de la gelernantoj kaj pasos la duan en kabano en la kantono Vaud. Estas antaŭviditaj lecionoj, ludoj kaj ekskursoj.

La buĝeto por tiu programo sumiĝas al 5'000 Fr. La Grande Ourse skribis al diversaj instancoj por trovi monon. La estraro de SES decidis pri deficit-garantio. **Nun ni petas**

vin kuri al la poŝto por donaci monon favore al tiu unika projekto.

Indiku „Aŭstralio“ sur la enpagilo. Ni volas nepre sukcesigi tiun projekton kaj ebligi agrablan kaj indan restadon al la for-foraj gelernantoj. Estas klare, ke la gazetoj raportos pri tiu aventuro. Nenio pli bone montras la lingvan utilon de

esperanto kaj ties amikigan efikon, ol tiu klasa vizito el Aŭstralio.

Nome de la estraro mi antaŭdankas vin pro via grandanimeco.

Bruno Graf, prezidanto de SES, la 10-an de aŭgusto.

-oOo-

PRI nia bulteno *SES informas*

Ekde la transforma fazo de la Biblioteko de la Urbo La Chaux-de-Fonds kaj de la translokiĝo de la CDELI-salono al pli prestiĝa situo, nia bulteno *SES informas* bedaŭrinde travivis veran aper-krizon. Se mi estus imaginta la kvanton da neatenditaj aldonaj aktivecoj, kiujn trudos la konstruaj laboroj, mi estus aliel planinta la eldonadon de nia revuo.

Nun per la apero de tiu ĉi junia-septembra numero ni espereble retrovas la tiom bezonatan akuratecon en la aper-ritmo de nia informilo. Tuj sekvos ankoraŭ septembre la dissendo de la oktobra numero 2005-4 jam pretigata, kaj por reveni al normala eldonritmo.

Mi havas la fieron povi nombri inter miaj kunlaborantoj lertajn redaktantojn. Richard Schneller transprenis la pretigon de *Kulturaj paĝoj*, kiuj konkludas la bultenon, kaj ĵus antaŭ ili aperas rubriko de Rolf Ernst aŭ Rolfo pri *Teknosofio aŭ* interreta tekniko. Kaj sin anoncas aliaj helpemuloj, inter kiuj Jean-Marc Leresche, nova esperantisto veninta al la lingvo per interreto.

Kaj helpas min por la dissenda enkovertigo mia regula CDELI-kunlaborantino Nancy Fontanaz, mia edzino Andrée Gacond kaj mia bofrato André Sandoz.

Kaj mi atentigas, ke la rondo de la kunlaborantoj estas neniel fermita. Ĉiu helpemulo, konvene reganta la lingvon kaj kapabla

verki, estas bonvena. Li aŭ ŝi prove sendu siajn artikol-projektojn.

Kaj ankaŭ mi aprezas ricevi raportojn aŭ restad-impresojn de partoprenintoj al la multnombraj esperanto-aranĝoj. Kiam vi revenas el kongreso, ne konservu por vi mem viajn memoraĵojn, sed konigu ilin per skribaĵo. Kaj ho, ne timu, mia tasko estas

kelkfoje gramatike aŭ stile aranĝi la materialon ricevitan, por ke ĉiu kontentu: nia legantaro kaj ankaŭ la verkinto, por ke li povu malkovri, kion mi faris el lia kontribuo!

Do, kuraĝon antaŭen!

Claude Gacond.

Tutsvisa aktiveco

CDELI

Centro de Dokumentado kaj
Esploro pri la Lingvo Internacia
Biblioteko de la Urbo

Progrès 33, CP 3034, 2303 La Chaux-de-Fonds. Tel. : 032 967 68 55.

Fakso : 032 967 68 29, indiki : por CDELI.

Retadresoĵ : cdeli.vch@ne.ch

martine.schneller@ne.ch

claudEGAcond@ne.ch

nancy.fontannaz@ne.ch

monika.molnar@ne.ch

Aktivecoj perturbitaj de la transformado de la biblioteko.

Ĉiuj didaktikaj studsabatoj povis okazi ĝis inkluzive tiu de junio, sed poste la organizo de la sekvaj aranĝoj devis ĉesi, ĉar la tuta biblioteka domo estas ĝisfunde transformata. Lifto kondukanta al la CDELI-etaĝo nun

konstruatas. Ĝi verŝajne jam ekfunkcios novembre, kiam povos reokazi la kursa aktiveco.

Tiuj transformoj ne interrompis la aktivecon mem de CDELI, sed ege komplikigis ĝin. Ekzemple la plej granda parto de la artivaĵoj devis esti transportita unue al supra ŝtupara etaĝo kaj poste en pli malpezaj skatoloj al la sonorileja subtegmentejo.

Reorganiziĝis ankaŭ la komputilaj kaj telefonaj instalaĵoj kun la nuna avantaĝo, ke iu ajn komputilo de la biblioteko estas utiligebla de iu ajn deĵoranto. Tio simpligos la laboron okaze de kunlaboro de staĝuloj.

Grava donaco

Maje el Nederlando CDELI ricevis gravan donacon de s-ro Derk Ederveen, kiu alportis la libron kaj revuaron apartenintajn al la inter-

lingvisto W. J. A. Manders. La registra laboro de tiu materialo, kiu konkludiĝis fine de aŭgusto atestas, ke per tiu donaco la kolekton de CDELI riĉigis 282 novaj libroj kaj dokumentoj. 77 jam ekzistantaj verkoj povis esti duobligitaj kaj 88 triobligitaj, kio ebligis ilian elpruntado. Kaj laŭ konvencio 349 libroj kaj dokumentoj jam en posedo de CDELI estis unue proponitaj al Reinhard Haupenthal en Malaucène por ebligi la kompletigoin de lia kolekto. Koncerne al la periodaĵoj 174 revuoj povis esti kompletigitaj kaj duoblaĵoj koncerne al 139 revuoj estis konigitaj al Reinhard Haupenthal. La libroj, dokumentoj kaj revuoj, kiujn li jam posedas riĉigos en CDELI la kolekton de la brokanta servo, kies listoj estas konsulteblaj interrete ĉe www///esperanto-gacond.ch.

Didaktikaj stud-sabatoj

La didaktikaj stud-sabatoj rekomenciĝos laŭ tiu ĉi kalendaro : novembre 19, 2006 januare 21, februare 18, marte 18, majo 20, junio 17. Ili okazas la 3-an sabaton de la monato helpe al ĉiuj esperantolernantoj : tutkomencantoj, komencantoj kaj progresantoj.

La sabata seminario

La sabaton 6-an de novembro komenciĝos la sabata seminario per prelego de André Cherpillod pri *Hillel la saĝulo, lia vivo, lia*

instruo, kaj pri la zamenhofa hilelismo.

La celo de tiu seminario ne estas la studo de la lingvo mem, sed kleriĝo koncerne al la historio kaj al la literaturo de esperanto. Jen la datoj de tiu seminario okazanta principe la unuan sabaton de la monato en neferia periodo : novembre 5, decembre 3, 2006 februare 4, marte4, aprile 1.

Ambaŭ aranĝoj disvolviĝas ĉe CDELI en la Biblioteko dela Urbo La Chaux-de-Fonds laŭ la sama horaro :

Horaro

9 h 30: Malfermo de la CDELI-salono kun eblo aĉeti librojn kaj babili kafumante.

10 h 30: **Oficiala malfermo**, formiĝo de la studrondoj.

11 h 00: **1-a studperiodo.**

11 h 45: paŭzo.

12 h 00: **2-a studperiodo.**

12 h 45: Paŭzo por komuna tagmanĝo en najbara restoracio.

14 h 30: **3-a stud-periodo.**

15 h 15: teuma paŭzo.

15 h 30: **4-a stud-periodo.**

16 h 15: **Konkluda kunveno.**

16 h 30: Teumo, librovendo.

17 h 00: **Oficiala fermo.**

17 h 30: Fermo de la CDELI-salono.

Aliĝo: Por faciligi la organizon de la studaj kaj seminariaj sabatoj ĉiu bonvolu nepre antaŭanonci sian partoprenon al Claude Gacond :

ĉu skribe : Claude Gacond, CDELI, Biblioteko de la Urbo, CP 3024, 2303 La Chaux-de-Fonds,

ĉu rete: claudio.gacond@ne.ch

ĉu telefone: CDELI: 032 967 68 55, (hejme 032 926 52 32).

Partoprenkotizo: Por minimuma kovro de la elspezoj la partoprenkotizo estas po Fr. 15.- por partopreno en la stud-sabato (lernejano, studento, metilernanto senpage), kaj Fr. 20.- por partopreno en la sabata seminario. Kiu ne antaŭanoncis sian partoprenon, tiu pagas pluse Fr 5.-.

ILEI

Svisa ILEI sekcio

Mireille Grosjean, prezidanto
Grand-Rue 9, 2416 Les Brenets.
Tel. : 032 932 18 88.
mireille.grosjean@rpn.ch

6 membroj de Svisa ILEI-Sekcio partoprenis la ĝeneralan asembleon de SES kaj parto de tiu kunveno estis dediĉita al nia Svisa ILEI sekcio. La prezidanto Mireille Grosjean salutis la ĉeestantajn membrojn: Nancy Fontannaz, Nicole Margot, Nicole Béroud, Jean-Thierry von Büren, Dietrich Weidmann. Ŝi menciis, ke la kunvenoj en La Chaux-de-Fonds ĉe CDELI, ĉu studsabatoj ĉu kulturaj sabatoj, okazas kadre de Svisa ILEI sekcio. Ŝi anoncis gravan okazontaĵon organizotan de Svisa ILEI sekcio kunlabore kun ILEI kaj UEA: tutmonda konferenco pri instruado de esperanto, kiun Claude Gacond kunlabore kun Mireille Grosjean intencas inviti sub la aŭspicio de ŝtataj instancoj, inter alie kun la Instrudepartemento de la Kantono Neuchâtel, la Haute Ecole Pédagogique BEJUNE, la Institut Romand de Documentation Pédagogique, la Conférence Intercantonale

de l'Instruction Publique CIIP. Jam ekzistas kontaktoj inter Mireille Grosjean kaj kunlaborantoj de tiuj instancoj. Temas pri kvarjara laboro; la unuaj kontaktoj okazos post la somero 2005. La du unuaj tiaj konferencoj okazis en la dudekaj jaroj en Ĝenevo kaj Prago.

Mireille Grosjean.

KCE

Kultura Centro Esperantista
Strato Postiers 27, Poŝtfako 311
2301 La Chaux-de-Fonds
Tel. & Fakso : 032 926 74 07
kce.esperanto@bluewin.ch

Raporto


Kun deko da partoprenantoj la Esperantologia Fakultato de KCE okazigis siajn kursojn dum la 2 unuaj semajnoj de aŭgusto. Instruis Duncan Charters el Usono pri instru-metodiko, Giorgio Silber pri la historio de la esperanto-kulturo kaj Usui Hiroyuki el Japanio pri interkulturaj demandoj.

Sekvis en salono de la muziklernejo kolokvo de PEN-Klubo kun dekkvino da intervenoj pri la temo *Esti virino kaj verkisto en la nuna mondo*. Pri ĝi tre pozitive raportis la taggazetoj *L'Impartial* de La Chaux-de-Fonds kaj *L'Express* de Neuchâtel la 18-an de aŭgusto. Vizite al tiu kolokvo kun mia edzino dum 2 muzikaj vesperoj ni havis la okazon ĝui pri la kant-talento de Jean-Thierry von Büren kaj Loretta Venturelli, pri la pianista arto de ilia akompananto

Giuseppe Giusta, pri la violonĉela ludo de Marion Bélisle-Grosjean kaj pri la nova kant-programo de Anjo Amika. Detalaj raportoj pri tiuj aranĝoj aperis en la aŭgustaj numeroj 2074 kaj 2075 de *Heroldo de*

Esperanto kaj en la somera numero 2 de la nova kaj tre impona revuo *Femina*.

Claude Gacond



Loka vivo

Averto : Por la oktobra numero 2005-4 de *SES informas*, kiu dissendiĝos fine de septembro la redakta datlimo estas jam je la 15-a de septembro. Informantoj pri la loka vivo bonvolu tuj havigi siajn raportojn ĝis tiu dato al Claude Gacond, Poŝtfako 3034, CDELI, Biblioteko de la Urbo, 2303 La Chaux-de-Fonds. Retpoŝto : claude.gacond@ne.ch .

Basel

Esperanto-Societo Basel

PF 103, 4005 Basel, Tel.: 0049 76 214 57 12
Kunvenoj : 20 h 00 en la kelo de la malantaŭa domo, Riehenring 129.

Kunvenoj

Septembre 22: Invito ĉe Nicole Bérout-Focke.

Oktobre 27: Ĉiu rakontu pri siaj ferioj.

Novembre 24: Programo 2005.

Decembre 10: Zamenhofa festo kaj cent-jariĝo de ESB. Ni invitas jam nun aliajn grupojn festi kun ni.

Genève

Esperanto-Grupo „La Stelo“

Case postale 188, 1211 GENÈVE 20

Espéranto-infos : Tel. : 022 740 04 45

Monata kunveno ĉiun unuan mardon de la monato (krom julie kaj aŭguste) en la stacidomo de Cornavin, kajo 1, Salle des conférences 2, je la 20 h 00.

Kunvenoj

Oktobre 4 : Diskutado pri kongresoj.

Oktobre prelegos Claude Piron en Uni Mail pri la temo « *L'anglais et/ou l'espéranto* ».

Novembre 1: Kun Claude Gacond: Hector Hodler kaj la paco.

Decembre 6 : Temo decidota.

Raporto

Pri la Lunda Grupo

La 4-an de julio la **Lunda Grupo** festis sian trian datrevenon. Tiu grupo estis kreita por helpi al la komencantoj ekparoli esperante. La ideo estas, ke sen instruanto aŭ gvidanto oni pli facile kaj senbremse babilaĉas, ne timante fari erarojn. Komprenoble ni klopodas ne erari, kaj nia ununura regulo estas, ke oni korektu sin mem, ĉar oni preskaŭ ĉiam scias, kiam oni eraras, ĉu ne? Nur kiam ni konstatas, ke iu (aŭ mi) ripetadas la saman eraron, tiam ni rajtas atentigi pri la eraro. Do notu, se vi estas komencanto aŭ se vi volas ekzerciĝi en la praktiko de esperanto, ke ni troviĝas ĉiun lundon en la restoracio *Aux Cheminots* ekde la 18-a horo. Oni povas laŭvole aperitivumi aŭ ankaŭ vespermanĝi.

Charmian.

Libro-Foiro 2005

Ĉijare ni denove partoprenis la Libro-Foiro en Ĝenevo de la 17-a de aprilo ĝis la 1-a de majo. Ni ĉeestis precize en la sama angulo de la *Village Alternatif* kiel pasintjare, kaj ni havis ĉirkaŭ la saman kvanton da vizitantoj: pli malpli 300, unuope aŭ grupe. Tamen estis granda diferenco: pasintjare ni aŭdis tre strangajn (stultajn) demandojn. Male ĉijare ni ricevis multajn pozitivajn reagojn kaj multegajn demandojn pri kursoj, ret-adresoj, ktp. Plurfoje oni diris al ni: *Jes, mi jam komencis lerni rete. Kiel kaj kie mi povas daŭrigi?* Niaj vizit-

antoj estis feliĉaj renkonti realajn kaj vivantajn esperantistojn!

Marie.

(El la septembra Brasikfolio 2005-7/9)

Lausanne

Laŭzana Esperanto-Societo

Case postale 389, 1009 PULLY

Tel: 021 729 58 02

<esperanto@isuisse.com>

<http://www.esperanto.ch>

Kunvenoj: Stacidomo, 1-a etaĝo, ĉiun unuan lundon de la monato je la 20 h 00.

Kunvenoj

Oktobre 3: Dominique gvidos la gramatikan rondon.

15: **Regiona Tago de SES** en la picejo *Le Milan* proksime de la stacidomo.

Novembre 7: Temo anoncota.

Decembre 11: **Zamenhofa Festo.**

2006 januare 9: Temo anoncota.

Februare 6: **Ĝenerala Asembleo.**

Raporto

Pri la tradicia ekskurso

Kiel kutime la 5-an de junio okazis nia ekskurso kun dekduo da membroj. Ni vizitis la vilaĝon St-Gingolph situanta inter lago kaj monto en du landoj: kazo unika. Ĝi do konas 2 politikajn sistemojn kun malsimilaj leĝoj lernejoj kaj poŝtofocejoj. Sed ekzistas nur unu paroĥo, unu tombejo kaj multaj komunaj asocioj. La disigan landlimon formas rivero. La preĝejo staras sur la franca kaj la muzeo en kastelo sur la svisa teritorioj. Gvidantino klarigis pri multaj tradicioj kaj pri la malfacila

pasinteco, kiam feliĉe kastanarboj alportis nutraĵon al la homoj. Ekzistis perlfabrika, kie juvelperloj estis faritaj el fiŝskvamoj. Nun tiu arto ankoraŭ ekzistas en Palma di Mallorca. Kun granda plezuro ĉiuj admiris 33 reduktitajn modelojn de malnovaj barkoj kun grandaj veloj birdecaj. Dum jarcentoj ili uziĝis kiel transportiloj. La vizito konkludiĝis en krespejo kaj per reveno per la Tonkin-trajneto.

Karlota Blanc-Maillard.

(El la septembra Informilo 2005-6)

Luzern

Lucerna Esperanto-Societo
Adligenstr. 1/49, 6020 Emmenbrücke
Tel.: 041 280 46 12.

Kunvenejoj:

Hotelo Steghof, Voltastrasse 2, atingebla de la stacidomo per la trolebusoj 4 kaj 5.
Hotelo Waldstätterhof, Zentralstrasse 4 (proksime de la stacidomo). Tel. 041 2 271 271.
Gesinoroj Anna & Koni Rey, Heimatweg 4, 6003 Luzern. Tel.: 041 210 25 88.

Kunvenoj

Oktobre 5: Ĉe ges-roj Rey: 14h00: Paroliga leciono kun Franz Brügger, 14h30: Universala Kongreso en Vilno, Litovio, kun Dieter Rooke.

Novembre 2: Waldstätterhof: 14h00-16h00: Konversacia rondo kun Franz Brügger.

Decembre 7: Ĉe ges-roj Rey: 14h00: Paroliga leciono kun Franz Brügger, 14h30: Zamenhofologio kaj programo 2006 kun Paul Scherer.

2006 januare 4: Waldstätterhof: 14h00-16h00: Konversacia rondo kun Franz Brügger.

Kantono de Neuchâtel

Esperanto-kursoj ĉe Université populaire en La Chaux-de-Fonds

La Ĉaudefona Popola Universitato anoncis novajn esperanto-kursojn, kiujn gvidos Monika Molnar en la CDELI-salono. Jen la datoj de la kurso 36 **Espéranto 1:** oktobre 19 kaj 26, novembre 2, 8 kaj 16. Kaj jen la datoj de la sekva progresiga kurso 37 **Espéranto 2:** novembre 23 kaj 30, decembre 7, 14 kaj 21. Ĉiuj diskonigu tiujn ĉi informojn cele al akiro de la po 15 necesaj aliĝoj.

Neŭŝatela grup-vespero

Post paŭzo pro la transformado de la biblioteko rekomenciĝos la neŭŝatelaj grup-vesperoj, kiuj principe disvolviĝas en la CDELI-salono la duan kaj kvaran merkredojn de la monato de la 19h45 ĝis la 21h45 aŭ aliloke sekve al propono de invitantoj. Jen la datoj de tiuj stud- kaj diskut-vesperoj:

Novembre 9 kaj 23.

Decembre 14: Zamenhofa Festeto.

2006 januare 11 kaj 25.

Februare 8 kaj 22.

Marte 8 kaj 22.

Maje 10.

Junie 14: fondua vespero.

Estas petita partoprenkosto de po Fr. 4.- por vespero por la kovrado de la elpezoj. Vigligos tiujn vesperajn renkontojn Monika Molnar, Claude Gacond kaj eble aliaj gvidantoj.

Wil

Esperanto-Klubo Wil

Prezidanto: Stanislaw POCHANKE

Lettenstrasse 70, 9500 Wil. Tel.: 071 911 68 30.

Vicprezidanto: Verena CHAVES-WALDER.

Rosenhügelstrasse 22, 9230 Flawil.

Tel.: 071 393 41 49.

Kunvenoj: la unuan merkredon de la monato je la 19 h 00 en la Restoracio Blumeneck, Säntisstrasse 1 (malantaŭ la stacidomo).

-oOo-

Zürich

Esperanto-Societo Zürich

Akazienstr. 6 / PF 858, 8034 Zürich-Seefeld

Tel.: 044 251 50 25 <info@esperanto.ch>

reto: www.esperanto.ch/zuriko

Programo

La 2-an dimanĉon de ĉiu monato en Esperantejo de la 14h00 ĝis la 17h00 libera kafejo kun ebleco babili kaj renkontiĝi kun geamikoj.

Konversacia kurso ĉiam merkrede vespere de la 18h00 ĝis la 19h45 en Esperantejo. (Ĝi ne okazas dum lernejoj ferioj).

Informoj pri tiuj-ĉi aranĝoj rete ĉe nelida@esperanto.ch, tel. : 044 251 50 25, fakse: 044 261 04 79 aŭ letere: Esperanto-Societo Zuriko, PF 858, CH-8043 Zuriko.

Dietrich Weidmann, prezidanto.

Telefona furoro: Skajpo

Interreta telefonado estas tio, kio ŝanĝos la telekomunan merkaton gravege dum la sekvantaj jaroj. Dum longa tempo la teknika kvalito de la interreta interparolo estis malbona (ankaŭ pro la malrapidaj retkonektoj iamaj) kaj apenaŭ progresadis. Sed la situacio subite ŝanĝiĝis, kiam Skajpo (angle: Skype) alvenis: la ilo por perkomputila telefonado kaj babilado.

Kion vi bezonas por skajpi? Komputilon kun interreta konekto (laŭeble rapida), laŭtparolilo(j)n au orelaŭdilon, mikrofona kaj la programeton Skype, senpage haveblan ce skype.com. Rekomendinda estas kapumaĵo (kombino de mikrofona kaj orelaŭdilo). Kaj ek!


Vi povas nun alvoki partneron, kiu samkiel vi uzas Skajpon kaj estas samtempe konektita al la interreto (tio estas indikata en via Skajp-adresaro). Se li au ŝi respondas, vi povas interparoladi, kaj tio okazas unue: tute sen aldonaj kostoj (krom la interretkonekto, kiun vi ja jam havas), kaj due: en frape bonega kvalito – oni havas la impreson, ke la kunparolanto sidas apude. Forgesu la plorindan kvaliton de la tradicia telefonado, kiu apenaŭ pliboniĝis dum la lastaj 100 jaroj.

La programeton Skajpo nuntempe haveblas jam en diversaj lingvoj, kaj aliaj idiomoj (eĉ esperanto) estas preparataj kaj disponeblaj en sekvontaj eldonoj.

Skajpo furoras, ne nur inter la tutmonde dise vivantaj esperantistoj, ne, ĝi estas ĉiel uzebla: kelkaj firmaoj uzas ĝin kiel enfirmaa interparola sistemo. Tuttere jam pluraj milionoj da homoj uzadas Skajpon.


Kaj tio ne estas ĉio: per Skajpo vi povas eĉ telefoni al normalaj telefonnumeroj – kvankam tio ne povas okazi senpa-

ge, tamen tre malmultekoste. Simple oni bezonas etan bonhavan ĉe Skajpo (kiu fakte estas telefonkompanio) kaj la koncernan telefonnumeron en la internacia formato (ekz. +41443508888 se vi volas alvoki la aŭtoron de tiu ĉi artikolo).



La skajpo-programeto montras, kiu estas konektita kaj kiu inter ili estas babilema ...

Facile intertelefonadi per kapumaĵo – viaj manoj restas liberaj.



La sukcesego de Skajpo iomete eniĝis la softvaran plejgrandulon Microsoft, kiu reagis rapide, plibonigante sian tujmesaĝilon MSN Messenger: Ekde la plej nova versio (7.0) eblas nun ankaŭ parole interkomuniki (antaŭe nur skribe). Ankaŭ la tujmesaĝil-pioniro, ICQ, donas parolan kapablon al sia plej nova programo (versio 5). Memkompreneble, ke tio estas nur la komenco – vidtelefonado jam preparatas – pretiĝu jam nun akirante kameraon, se ŝajnas al vi nepra ... ♦

Prilaboratas esperanto.ch

Unu el la plej unuaj retpaĝaroj pri kaj en esperanto, nome esperanto.ch, apartenanta al la Allsprachendienst Esperanto GmbH, ricevas novan vizaĝon dum la sekvantaj semajnoj: La internacia lingvo estas prezentota en freŝa, moderna optika aspekto. La paĝaro estas grava portalo por la svisa esperanto-movado. ♦

Trafa reago

En la ĝeneva gazeto « Le Courrier » de la 21a de februaro 2005, paĝo 10, aperas letero de Claude Piron pri komunikado kaj esperanto.

Jen ĝia traduko fare de la aŭtoro :

En la numero de la 1-a de februaro vi prezentas sur paĝo 9 foton de hotelo Bernerhof en Interlaken kun sub ĝi la vortoj « Ĉu la ĉina fariĝos la nepre lernenda lingvo? ». Suverena fuŝo (« plantée magistrale », eble pli svisa ol franca esprimo) : la menuo, kiun montras la foto, estas en la korea, ne la ĉina.

La esprimon « suverena fuŝo » mi ĉerpas el la artikolo « Haltigu informadon laŭ nuraj komercaj interesoj », sur paĝo 15 de la samtaga numero, kie Yves Steiner aplikas ĝin al la traduk-sistemo de la Monda Sociala Forumo en Porto Alegre. Estas bedaŭrinde, ke li ne klarigas pli bone. Tiuj du vortoj tamen sufiĉas por emfazi la gravecon de lingvobaroj en ĉia mondskala demokratia iniciativo, ĉefe kiam partoprenas la malplej favoratoj de nia planedo, tiuj, kiuj havas nek tempon nek monon por lerni bone regi la anglan.

La gravecon de komunikado libera je la devo uzi la lingvon de Ŝekspiro kaj de « Wall Street Journal » bone reliefigas Bernard Cassen (temas pri la direktoro de la fama franca periodaĵo « Le Monde diplomatique ») en sia artikolo, kiun vi publikigas sur paĝoj 8 kaj 9, pri la diktatoreco de la angla lingvo, kontraŭ kiu simile invitas lukti

la tute trafaj rimarkoj de Françoise Ploquin sur paĝo 9.

Preteratentata opcio : esperanto

Sed ĉiuj ĉi konsideroj rondpromenas ĉirkau la centro de la demando sen kuraĝi aliri ĝin. Kio signas la transiron de infana pensado al plenkreskula, instruis al ni Jean Piaget (fama psikologia profesoro de Ĝeneva Universitato, mortinta en 1980), tio estas la kapablo preni en konsideron ĉiujn eblojn, ĉiujn respondojn al unu demando. Tial oni bedaŭru, ke en la konstante reaperanta debato pri la angla kaj pri internacia lingva komunikado, unu el la opcioj preskaŭ ĉiam estas preteratentata, nome : esperanto. Kiu ajn ĉeestis internaciajn diskutojn laŭ la diversaj nuntempe uzataj sistemoj – angla kiel sola komunikilo, interpretado, ĉu samtempa, ĉu posta al kaj de limigita nombro da lingvoj, esperanto – tiu konstatis, ke ĉi-lasta ege superas la aliajn, kiom koncernas fluecon, spontanecon, ekzaktecon kaj plezuron esprimi sin sen inhibo kvazaŭ oni uzus la gepatran lingvon. Krome, ĝi estas la plej malmultekosta sistemo, la plej rapide akirebla kaj la sola vere demokratia (ĝin povas regi la plej malfavoratoj, kaj estante lingvo fremda por ĉiuj, ĝi metas ĉiujn sur egalan nivelon).

Studado de proksimaj lingvoj

Kial tiuj, kiuj pritraktas la lingvajn barilojn kaj la sociajn kaj kulturajn

malbonrezultojn de la monopolo de la angla lingvo konstante ignoras ĝin? Tio estas des pli bedaŭrinda, ĉar esperanto estas unu el la plej bonaj rimedoj preparantaj al sukcesa akiro de aliaj fremdaj lingvoj. Persone, mi siatempe neniam celus kaj ricevus diplomon pri la ĉina lingvo, se, je la aĝo de dek kvin jaroj, mi ne korespondus en esperanto kun juna ĉino, kiu inicis min al sia kulturo kaj rimarkigis al mi, ke, same kiel la ĉina, esperanto konsistas el nevariaj eroj senfine kombineblaj sen ajna limigo.

Ĉu la rajto je komunikado signifas ion, se la plimulto el la homoj ne povas disponi internacian komunikilon, ĉar la tro granda komplekseco de la naciaj lingvoj igas ilin tro malfacilaj? Limigi sin je la studado de proksimaj lingvoj, kiel proponas Bernard Cassen, ne solvas la problemon. Kiam ĉeĥo, franc-lingva sviso kaj japano devos diskuti pri iu problemo, kiom utilos, ke ili respektive lernis la rusan, la hispanan kaj la ĉinan? Memgolo! (France: « autogoal », termino el la piedpilka sporto, signanta, ke teamo ĵetis la pilkon en la propran celejon.) Ĉar ja necesas interkompreniĝi, ili revenos al la angla, kiun ili volis ekskludi por

liberigi sin je ĝia influo sur ilian pensmanieron.

Garantio pri mensa sendependeco

Se oni konsideras ĉiujn eblojn, oni konstatas, ke esperanto havigas la solan garantion pri mensa sendependeco, ĉar ĝi konfidas la rolon de peranto al lingvo libera je ĉiaj ekonomikaj, politikaj, religiaj au ideologiaj ligoj, lingvo, kiun naskis pli ol jarcento da interagado inter personoj kun plej diversaj kulturoj, la sola lingvo, kies subtavolo (substratumo), kiel lingvistoj diras, estas plene interkultura.

Kiam ni transiros de infana al plenkreska pensado? Ĉu estas neeble al politikaj kaj kulturaj respondeculoj forpreni la okulvindaĵon, kiu malhelpas al ili vidi, kiel disvolviĝas rilatoj tie, kie esperanto estas uzata? La homaro fariĝos plenkreska nur kiam ĝi ĉesos apriorie ekskludi opcion, kiun ĝi forĵetas nur surbaze de onidiroj au subjektivaj impresoj, neniam komparitaj al la surterena realo. Tiu sinteno estas des pli neakceptinda, ĉar temas pri la kampo, kiu markas la specifecon de la homaro rilate al bestoj: lingvo.

Claude Piron

Poliglota mondo por eskapi anglo-usonan diktaturon...

Tre interesa dupaĝa artikolo aperis la 1an de februaro 2005 en « Le Courrier ». Tiu ĝeneva ĵurnalo fakte reproduktis analizon aperintan en « Le Monde Diplomatique », kaj vi povas ĝin trovi sur ties retpaĝo en esperanta versio, sekvata de forumo¹. La arti-

kolon verkis Bernard Cassen, direktoro de « Le Monde Diplomatique ».

La aŭtoro unue klare denuncas la imperieman hegemonion de la angla lingvo kaj, sekve de tio, la tendencon instrui nur ĝin en la elementaj lernejoj. Mi citu kelkajn frazojn: « Proponi

devigan instruadon de la angla en Francio aŭ alie en la Eŭropa Unio, estas afero alte politika, sen granda rilato kun bezonoj de < komunikado >... La usona imperia potenco baziĝas ne nur sur materiaj faktoroj (militaj kaj sciencaj kapabloj, produktado de havaĵoj kaj de servoj, regado de la energiaj kaj monaj fluoj ktp.): ĝi entenas ankaŭ kaj precipe la regadon de la mensoj, do de la kulturaj referencoj kaj signoj kaj tute aparte de la lingvaj signoj. » Tiu « posedo de la hipercentra lingvo donas al Usono eksterordinaran avantaĝon » :

– ideologian ĉar ĝi « instigas la plejparton de la tutmondaj < elitoj >... vasaliĝi al la lingvo de la majstroj ».

– ekonomian: « la aliaj landoj financas la kostojn de lernado kaj de tradukado el (aŭ al) la angla ».

« Tiuj ideologiaj kaj ekonomiaj faktoroj fortigas sin reciproke kaj kontribuas al la solidigo de la plenvasta lingva unupoluseco. La strebo al multpolusa mondo, se ĝi volas esti konsekvenca, devas esti logike akompanata de strebo al lingva ordo siavice ankaŭ multpolusa. »

La aŭtoro proponas respondon, kiun li mem konsideras « almenaŭ partan ». Ĝi kuŝas en la konsidero de koncepto pri « lingvaj familioj ». Laŭ demografia vidpunkto oni povas konsideri tri blokojn kun komparebla graveco: angla, ĉina, latinida, kaj poste la araba.

De la rando ĝis la centro de la galaksio

En tiu subartikolo la aŭtoro citas la studojn de la lingvisto Abram de Swaan, kompletigitajn de tiuj de Louis-

Jean Calvet. La sistemo proponita ordigas la lingvojn laŭ « gravita » aŭ « galaksia » ordo, rezulto, laŭ la aŭtoro de tiu artikolo, de historiaj potenciaj akiroj kaj de nuntempaj ekonomiaj kaj ideologiaj fortrilatoj. « La konkero de la mensoj estas tiurilate pli decida ol tiu de teritorioj. »

Tiu sistemo ordigas la lingvojn en hierarkia sistemo laŭ pluraj niveloj: periferiaj, centraj, supercentraj kaj hipercentra. Ĝi konsideras, ke je la bazo ekzistas proksimume 6000 lingvoj, el kiuj 90 % estas parolataj de malpli ol 5 % de la monda loĝantaro. 500 el ili estas parolataj de po 100 homoj. Papuo-Nov-Gvineo tenas la rekordon, ĉar en ĝi oni povas nombri 850 lingvojn. La membroj de tiaj grupoj komuniĝas per komuna lingvo de rekte supera nivelo, la centraj lingvoj, kiel la keĉua en Sud-Ameriko, la bambara en Afriko ktp. Ĉiuj eŭropuniaj lingvoj estas centraj por la « minoritataj » lingvoj de la koncernataj ŝtatoj, dum kelkaj estas pli centraj ol la aliaj, la supercentraj, angla, araba, ĉina, franca, hindia, hispana, japana, malaja, portugala, rusa, kaj svahila. Venas la supercentraj, kiuj rolas en regiona aŭ internacia spaco: angla, franca, hispana, portugala. Kaj tutcentre, la hipercentra, la angla.

Familia spirito

En tiu artikolo de Françoise Ploquin, ne tradukita en esperanton, la aŭtorino unue konstatas la ĝenon de franco, kiu petas informojn anglalingve en strato de Florenco, Seviljo, Koimbro, Montevideo aŭ Porto Alegre. Ŝi konsideras, ke interkompreniĝo inter latinidlingvoj estas ebla kaj rapide akirebla.

« Interkompreniĝo estas la fakto kompreni la lingvojn sen ilin paroli. » Same funkcias en aliaj lingvaj familioj, kiel la slavaj, ĝermanaj, skandinavaj ktp. Dum la lasta jardeko interesaj studoj estis kondukitaĵoj pri lernado al interkompreniĝo de la romanidaj lingvoj. La studoj kondukitaĵoj de Claire Blanche-Benveniste en la Universitato de Provencio (Aix-Marseille), Eurom 4, demonstras, ke por studentoj ne fakaj pri lingvoj en 60 horoj parolanto de romanida lingvo sukcesas legi kaj kompreni tekstojn en tri aŭ kvar aliaj lingvoj (libro, enciklopedio, gazet-artikolo). Por la plejmultaj tamen necesas iom pli da tempo por bone kompreni paroladon (konversacion, filmo, radion kaj televidon). « Veras, ke la instruistaro, kiu kutimas instrui lingvon en sia tuto, ne facile akceptas tiun limigitan lernadon. En la tekniko de interkompreniĝo, ĉiu aŭskultas la alian kaj la produkto en fremda lingvo iĝas senutila. » Tio signifas, ke ni komprenas la alian en sia lingvo kaj respondas en la propra.

Sur la retpaĝo la artikolo estas sekvata de kelkaj leteroj de esperantistoj,

kiuj kontestas la fakton, ke plurlingvismo estu solvo al la diktaturo de la angla. Unu parolas pri esperanto, kiel « la nura racia solvo ». Tamen, laŭ mi, tiu analizo estas ege interesa kaj serioza. Oni devas konsideri, ke « Le Monde Diplomatique » sufiĉe alte estimas esperanton por ebligi la retan aperon de esperantista versio paralele al 17 aliaj lingvoj. Komprenoble por esperantisto plurlingvismo ne povas esti solvo al anglo-usona diktaturo, sed nur alte defendenda celo, por kiu esperanto estas nuntempe la plej efika helpilo. Esperantistoj ne devus forgesi, ke por akcepti esperanton oni devas unue konsciiĝi pri lingvaj problemoj, kiel bone faris tiu artikolo (tial oni povas ĝin konsideri kiel necesa unua etapo) kaj poste sperti diversajn solvojn inter kiuj eble malkovriĝos esperanto. Vi povas vidi en la letero de Claude Piron, kiel li interesplene kompletigis tiun artikolon pere de letero de leganto.

Nicole Margot

¹<http://eo.monedediplo.com/article966.html>
(Se vi ne havas retaliron, mi volonte sendos presajon.)

Recenzo : « Esperante kaj ekumene »

Festlibro por la 75a naskiĝtago de Adolf Burkhardt. Editoris Irmi kaj Reinhard Haupenthal, Edition Iltis, Schliengen 2004, 368 paĝoj kun bibliografio kaj biografiaj notoj pri la kunlaborantoj.

En la enkonduka ĉapitro oni trovas post la antaŭparolo de Reinhard Haupenthal « Biografian skizon pri A. Burkhardt » de lia filino

Regina Lorösch (vidu « SES informas » 3/2004, paĝoj 36-37).

Teologio

La ĉapitron Teologio malfermas la altlerneja bibliotekisto Philippe Cousson per la demando : « Teologia dokumentado en Esperanto ? » Per statistiko li montras la relativan etecon de esperantaj publikaĵoj, ĉu strikte

teologiaj ĉu ĝenerale por kredantoj kompare kun aliaj lingvoj. Poste sekvas priskribo de la diversaj klasifikoj de dokumentoj. Fine la aŭtoro pritraktas la rolon de la uzo de esperanto kaj la celojn de teologia dokumentado en nia lingvo, la prioritatojn kaj eblojn, konkludante per la demando al la leganto : « Kiun teologian dokumentadon ni volas kaj povos havi en Esperanto ? » Certe fakuloj kaj interesatoj respondos.

La pastro Bernhard Eichkorn prilumas per « Esperanto en la servo de la ekumena movado » la historion de tiu movado en ligo kun Adolf Burkhardt, kies laboron por diservaj kantlibroj (laste « Adoru », 2001) li ilustras per ekzemploj. Plue li citas lin pri la respektiva rolo de la angla kaj esperanto, kiujn Adolf Burkhardt lernis ambaŭ antaŭ 50 jaroj kaj same bone regis : « Kiam mi skribas artikolon en Esperanto, aŭ predikas sen manuskripto, mi certas ke ĉiumomente mi parolis ĝuste sen balbuti. En la angla mi neniam atingos ĉi senton pri hejmeco propra al denaska parolanto. »

La finna emerita docento por muzikscienco T. I. Haapalainen montras en « « Mi ne komprenas... » – unu himnohistorio » la originon de finna diserva kanto. Post longa, preskaŭ detektiva serĉado evidentiĝas ke la teksto estis transprenita antaŭ jarcentoj el la nederlanda kaj malkovriĝas ke la melodio devenas de profana amkanto. Do la kulturaj interŝanĝoj kaj reciprokaj influoj estis ĉiam viglaj en la eŭropa historio.

Albrecht Kronenberger, ĉefkunlaboranto al « Adoru », ĉerpas el sia prediko de la jaro 2002 per « Kiu kantas, preĝas duoble ». Elirante de ĉi tiu germana proverbo li konstatas, ke kanto havas difinitan strukturon laŭ la leĝoj de poezio kaj muziko kaj li konkludas : « Kanti, do sin submeti al tiuj strukturoj, signifas ĉiam paŝi el la ĥaoso al ordo, konscie sin enordigi en la tutan kosmon, plifortigi la estetikan ĝuon kaj transpaŝi ĝin al ĝuo de Dio mem. »

Grava kunlaboranto per fortepianaj partituroj kaj aranĝoj al « Adoru » estis Ernst Leuze, iama eklezia muzikdirektoro. En « La stelo siringoviola – projekto pri la ekumena

himnaro « Adoru » » li klarigas per karakterizaj detaloj kaj ekzemploj kiamaniere li aranĝis la melodiojn de la kantoj por fortepiana akompano.

« Ĉu eblas studi religihistorion en Esperanto ? » Ĉu ekzistas sufiĉe da sanktaj skribaĵoj kaj sciencaj traktaĵoj en esperanto de kaj pri la mondaj religioj, ke eblus studi religihistorion per la internacia lingvo ? Al tiuj demandoj Leif Nordenstorm, doktoro pri teologio, bedaŭrinde devas konkludi per nea respondo.

La prezidanto de KELI (Kristana Esperantista Ligo), Jacobus Antonius Tuinder, en « Adolf Burkhardt : esperantista pastoro kun ekumena koro » analizas la ĉefelementojn kiuj modlis la jubileulon : Zamenhof, la evangelio kaj la muzoj. Li montras kiel ĉi tiuj influoj konkretiĝis en lia ekumena agado. Interalie rilate al KELI, kiun dum longaj jaroj pastro Burkhardt per sia organiza talento entuziasme kaj kompetente prezidis, la aŭtoro mencias ke « ... por li estis granda sufero, ke nun tro stagnas la kristana esperanto-movado... pro plene ŝanĝiĝantaj tempoj kaj cirkonstancoj, inter kiuj la vasta sekulariĝo kaj ĉie videbla senekleziigo ŝlosilas. »

Esperantologio

La unua artikolo de la ĉapitro Esperantologio estas franclingva : « Naissance du CDELI » (Naskiĝo de CDELI, Centro de dokumentado kaj studo pri la internacia lingvo). Claude Gacond rakontas la naskiĝon en la sesdekaj jaroj de ĉi tiu institucio, kiu celas la arĥivadon kaj studadon de dokumentoj el ĉiuj planlingvoj, sed granda parto tamen estas esperantlingva. Jam en la kvindekaj jaroj Claude Gacond konstatis ke valora materialo laŭ vidpunkto de historiisto (libroj, revuoj, leteroj, ktp.) el bibliotekoj de individuoj aŭ lokaj grupoj perdiĝis post forpaso de la posedintoj. Por kolektado kaj arĥivado de tia materialo li trovis apogon de la tiama direktoro de la Urba Biblioteko de Ĉaŭdefono, Fernand Donzé. La komenco estis modesta – kelkaj bretaroj en koridoro kaj subtegmenta ejo vintre nehejtita – se oni komparas kun la nuna stato. Post kvinjara

hezito ankaŭ SES subskribis en 1965 la statuton kaj konvencion de la biblioteko kaj transdonis siajn arĥivaĵojn al CDELI. Post la morto de Edmond Privat en 1962, Claude Gacond instigis la vidvinon Yvonne Privat heredigi la tutan bibliotekon de sia edzo – ne nur esperantlingvan – al la biblioteko de Ĉaŭdefono. Oni akceptis ĝin kiel valoran fondaĵon. Ek de 1965 Claude Gacond kaj volontuloj helpitaj de la bibliotekistino Suzanne Boichat komencis la katalogadon de la materialo. La iama direktoro de UEA, Hans Jakob en Ĝenevo, principe konsentis pri cedo de siaj arĥivaĵoj al CDELI, sed bedaŭrinde li grave malsaniĝis kaj ne plu povis subskribi la koncernan konvencion. Post la morto de Hans Jakob okazis aŭkcio de liaj arĥivaĵoj, ĉar lia filino deklaris sin neheredanto sekve de plendo kontraŭ Hans Jakob pri malbona administrado de UEA far profesoro Ivo Lapenna. Claude Gacond partoprenis ĉi tiun aŭkcion en la nomo de CDELI kaj kun apogo de la biblioteko. Fakte estis tuta aventuro kun multaj obstakloj, sed fine li sukcesis akiri tridekon da valoraj libroj – vera trezoro! Dum vizito de Claude Gacond en Londono en la jaro 1972, profesoro Lapenna esprimis sian bedaŭron ke li ne subtenis la kreadon de CDELI kaj ke li dubis pri la honesteco de Hans Jakob. Intertempe CDELI akiris prestiĝan renomon kaj serĉistoj venas eĉ el foraj landoj por konsultado.

Geoffrey King, diplomita bibliotekisto en Londono, prezentas sur 27 paĝoj « Indekson por la « Klasifo de esperantaj temoj » de Montagu C. Butler (1887-1970) » eldonita en la kvindekaj jaroj kaj la sola detale ellaborita fakklasifo pri esperanto laŭ la sistemo de Dewey.

Kristianismo kaj planlingvoj

Andreas Künzli, ĉefredaktoro de la « Svisa Planlingva Leksikono » (aperonta), pritraktas la temon « Kristianismo kaj planlingvoj en Svislando ». Enkonduke li ekzamenas la religiemon ĉe Schleyer kaj Zamenhof. Por Schleyer la kreo de Volapük estis kvazaŭ dia inspiro. La hilelismo-homaranismo de Zamenhof estis kritikata de diversaj flankoj,

tamen lia humanisma idearo transvivis en la esperantismo kiel « interna ideo ». La traduko el la hebrea de la Malnova Testamento realiĝis ne nur pro la intenco disvastigi la internacian lingvon, sed ankaŭ atestas pri la religia intereso de Zamenhof. Menciindas ke ankaŭ al Volapük, Ido, Interlingua kaj Universal estis tradukitaj partoj de la Biblio. La kristanaj esperantistoj agadas en Svislando per la internaciaj asocioj IKUE (katolikoj) aŭ KELI (protestantoj). Pastro Wilhelm Flammer estis grava funkciulo de IKUE kaj organizis ties kongreson en 1966 en St.Gallen. Li estis ankaŭ dum du jaroj redaktanto de « Svisa Espero ». Svisa sekcio de KELI fondiĝis en 1951 kaj prezidis ĝin Fritz Liechti. De 1973 ĝis 1986 aperis « Kristana Bulteno » redaktita de Hans Wyss. – Agadis ankaŭ kelkaj profesiaj ekleziuloj kun la celo disvastigi la planlingvojn Volapük, Ido, Esperanto, Occidental aŭ Interlingua. Ekzemple la berna protestanta pastro Friedrich Schneeberger unue famiĝis kiel esperantisto kaj poste kiel idisto. Li partoprenis la unuan UK en Bulonjo-ĉe-Marŝo (1905) kaj eĉ prezidis la duan UK en Ĝenevo la venontan jaron. En 1908 li transiris al Ido kaj agadis vigle por ĉi tiu planlingvo. Menciindus pli detale ankaŭ Jules Gross (Volapük, Ido), Adolphe Creux (Esperanto, Ido, Occidental), Flurin Maissen (Occidental-Interlingue, romanĉlingvano), Paolo Castellina (Esperanto, Interlingua).

Leif Nordenstorm, sveda luterana pastro kaj iama redaktoro de « Kontakto », enketis pri la vivo de « Otto Zeidlitz (1860-1943), pastro, pedagogo kaj esperantopioniŝo ». La nomo de Zeidlitz aperas kiel tradukanto de poezioj respektive en la « Fundamenta Krestomatio » kaj la tiam unusola esperantorevuo de la mondo « Lingvo Internacia », de 1895 ĝis 1900 eldonita en Upsalo kaj presita en Luleå. Oni karakterizas lin kiel fortan personulon multtalentan, ne nur pedagogo kaj verkisto, sed ankaŭ bankisto, ekonomo, agrikulturisto, ktp. : interesaj biografiaj informoj pri esperantopioniŝo ĝenerale nekonata de la esperantistoj.

Bernhard Pabst, juristo pri internaciaj rilatoj, lingvisto kaj kunlaboranto al diversaj

vortaroj, verkis 33-paĝan biografion pri « Marie Hankel (1844-1929), poetino, organizantino, feministino » kun detala kvarpaĝa bibliografio. Marie Hankel estis burĝa edzino de profesoro kaj vidviniĝis 29-jara. Konata kiel « la unua poetino de esperanto », ŝia rolo en la movado estis pli ampleksa : 61-jara ŝi lernis esperanton en 1905, korespondis kun Zamenhof instigante lin verki plenan gramatikon (kiu ne realiĝis, sed aperis la « Lingvaj respondoj ») kaj estis en la organiza komitato por la Dresdena UK (1908). En parolo dum la 6a UK en Vaŝingtono (1910) ŝi pledis por la balotrajto por virinoj. En la aĝo de 85 jaroj ŝi mortis en la Zamenhofa tago de la jaro 1929.

Annakris Szimkat, interalie arĥivisto, enkondukas al « Dokumentoj ĉirkaŭ la morto de unu biblioteko » pro likvido fare de la nazia reĝimo de la biblioteko de la renoma Esperanto-Instituto por la Germana Regno posedinta 3000 erojn. En 1936 la tiama prezidanto de ĉi tiu instituto, Albert Steche, sukcesis savi la valoran dokumentaron per transfero al la Prusa Ŝtata Biblioteko en Berlino.

Interlingvistiko

La ĉapitron Interlingvistiko enkondukas la profesoro pri grafematiko kaj kompara ortografio Otto Back per « Lingvo-inventado en la Danuba monarkio ». En ĉi tiu regiono la volapükistoj estis multnombraj. Troviĝis poste ankaŭ adeptoj de Esperanto kaj Ido. Sed la plej grava kontribuo por evoluigo de planlingvoj estis tiu de la fervoja teknikisto Julius Lott (1845-1905), kiun oni rigardas kiel unu el la fondintoj de la « naturalisma skolo », pli precize « naturalisma okcidenteŭropa internaciisma », por kiu la vortprovizo havas prioritaton antaŭ la gramatiko (li kreis Mondolingue). Aliaj aŭtoroj klopodis simpligi la latinon kiel planlingvon, ankoraŭ aliaj prenis kiel bazon la romanidajn lingvojn aŭ kreis interslavan planlingvon.

La interlingvisto Detlev Blanke omaĝas per eseo pri la interlingvistikaj konceptoj kaj planlingvaj projektoj de Ernst Beermann (1853-1936). Tiu filologo naskiĝis en Erfurt kaj iĝis gimnazia profesoro por la latina,

greka, germana kaj historio. Li studis la problemojn de mondolingvo, malkontentis pri Volapük, Esperanto kaj Ido kaj proponis la planlingvan projekton Novilatin. Unu el la interlingvistikaj principoj de Beermann estas, ke mondolingvo ne estu unu el la « naturaj » lingvoj por eviti la negativajn sekvojn de hegemonio : « La hegemonio de la angla lingvo estas kaŭzata per la potenco-pozicio de la angle parolantaj popoloj. Kiu povas aserti ke tio restos ĉiam la sama ? » (1890).

Constantine Dominte kaj Iosif Nagy, docentoj respektive pri rumanistiko kaj kemio, prezentas bibliografian skizon pri « Interlingvistiko kaj esperantologio en Rumanio ». Temas pri bibliografio de verkoj aperintaj en Rumanio en rumana, hungara, germana aŭ esperanta lingvoj kaj ampleksanta 22 paĝojn.

Reinhard Hauptenthal en « La pastro de Litzelstetten » vive pentras per citoj el tiamaj dokumentoj kaj la taglibro de la pastro la katolikan medion kaj dekjaran fekundan periodon el la vivo de la aŭtoro de Volapük, Johann Martin Schleyer. De 1875 ĝis 1885 ĉi tiu oficis en vilaĝo proksime de Konstanco kaj tie havis ne nur la inspiron por kreo de Volapük, sed travivis ankaŭ kulminan vivperiodon kiel pastro, verkisto en la germana (poezioj, dramoj), muzikisto kaj redaktoro de revuoj en la germana kaj Volapük (« Volapükabled »).

Literaturscienco

Honorante Adolf Burkhardt en la parto Literaturscienco, Marjorie Boulton dediĉas studon al « Romanista koncepto de ideala kristana pastoro : Sinjoro Eden de Charles Reade (1814-1884) ». En sia romano « Neniam tro malfruas por ripari » Charles Reade – samtempulo de Dickens kaj Trollope, sed hodiaŭ forgesita verkisto – priskribas « bonan homon » en la angla kulturo dum la regno de Victoria : pastoron Francis Eden, kiu sentas sin devigata plenumi sian taskon en prizono kaj sukcesas tie ŝanĝi la drastan reĝimon tiuepokan – malgraŭ la malhelpo de etspirita kolego – kaj tiel morale kaj eduke helpi la kondamnitajn. En Eden oni vidas homon kun

altaj kaj rigoraj idealoj, sed tamen kun granda realismo pri la homaj malfortoj.

Carlo Minnaja, profesoro pri matematiko, eseisto, recenzisto kaj tradukisto, prezentas « La beletran faceton de la revuo « Horizonto » dum la hispana periodo (1976-1980) ». Lia kontribuo ankaŭ aludas al la historio de la Neŭtrala Esperanto-Movado ĉirkaŭ Ivo Lapenna ligita al ĉi tiu revuo ne nur movada sed ankaŭ beletra. Redaktis ĝin Inés Gastón kun la redakta komitato de Fernando de Diego, Juan Régulo kaj Jean Thierry. Kunlaboris en la literatura parto altnivele G. Waringhien, F. de Diego, I. Drawter, R. Haupenthal, M. Boulton kaj multaj aliaj ĉu originale ĉu traduke. Al la hispana periodo sekvis nederlanda, sed post la

morto de Ivo Lapenna en 1987 la revuo ĉesis aperi.

En la lasta artikolo de ĉi tiu libro mi mem kontribuis per « Konciza historio de la presarto kun aparta konsidero al la Esperanto-literaturo » kaj prezentas kelkajn sciindajn historiajn faktojn pri presado laŭ teknika kaj arta vidpunktoj.

Koncerne la eksteran aspekton de « Esperante kaj Ekumene » la foto surkovrila impresas min pompe ceremonia, tamen la enhavo grandparte ne estas tia. Bedaŭrinde la ilustraĵoj de la libro ne ĉiam estas egale bonkvalitaj.

Richard Schneller

Ideologioj kaj Esperanto

De la 7a ĝis la 9a de oktobro 2004 en la Aŭstra Nacia Biblioteko en Hofburg (Vieno) okaze de la 75-jariĝo de la Internacia Esperanto-Muzeo (nun: nur Esperanto-Muzeo) kaj de la 100-jariĝo de la naskiĝo de Lidia Zamenhof estis organizita la simpozio « Esperanto en la uragano de la ideologioj ». Partoprenis kvardeko da personoj.

Unue en la muzeo mem okazis malfermo de ekspozicio pri esperantistaj viktimoj pro ekstremaj ideologioj, kiaj naziismo kaj stalinismo. La ekspozicio estas ege impresa kun dokumentaro pri personoj kiuj viktimiĝis.

Mallongan malferman enkondukon faris Herbert Mayer, gvidanto de la muzeo.

Humphrey Tonkin prelegis pri ideologia batalo en la Esperanto-movado mem en la 1970-aj jaroj inter la lapennistoj kaj la posteuloj de Lapenna. Tio estas la unua dokumento de homo, kiun Lapenna plej multe atakadis. Detlev Blanke prelegis pri « Esperanto en GDR kaj la tiamaj kondiĉoj por Esperanto en la orienta bloko ». Esence temis pri la negado de la ĝenerala konvinko, ke tiam

la Esperanto-movadon gvidis rusoj kaj ke ili ĉiuj estis unuecaj. Wera Blanke parolis pri kontraŭglobalisma movado « Alimondista movado » kaj donis interesajn faktojn pri ties historio kaj rilatoj kun Esperanto.

La vendredan vesperon oni omaĝis al Lidia Zamenhof. Tri prelegantoj parolis pri ŝiaj vivo kaj agado, pri ŝia verkista laboro, esperanta kaj bahaa.

Sabate prelegis Claude Piron pri « La tiel nomata fiasko de Esperanto ». Li regalis nin per interesaj psikologiaj argumentadoj por Esperanto kaj klarigis iujn kaŭzojn por kontraŭesperantaj starpunktoj. Sekvis mia prelego « Kio estas ideologio? ». Ideologio estas aro da ideoj, kiuj klopodas doni la respondojn al la demando « Kial vivi? ». Pro tio ĉiu grupo (eĉ la plej malgranda) havas iun neskribitan ideologion, dum la grandaj difinas ĝin kiel elementojn de lerneja edukado (nacia, religia). Ideologio fariĝas negativa, kiam grupo estas endanĝerigita (ĉu vere aŭ ĉu artefarite) kaj tiam ĝi difinas ankaŭ la malamikojn, kiujn oni devas detrui.

Heiner Eichner parolis pri rilato inter la movado kaj kelkaj grandaj internaciaj strukturoj: la dua Internacio, la Ligo de Nacioj, UN/Unesko kaj EU. Vilmos Benczik parolis pri la nova difino de lingvo el vidpunkto de literaturaj teoriistoj, Ed Borsboom prezentis sian libron pri Andreo Cseh tre sprite, kvan-

kam ofte temis pri gravegaj problemoj, kiujn Cseh havis pro la nazioj.

Zlatko Tišljarić

(« La Ondo de Esperanto », 11/2004.)

Tekstoj, kantoj, muziko, poezio

Kompaktdiskoj

Ĉu vi scias ke ekzistas libroj, revuoj, kursoj, vortaroj... surdiskigitaj? Jen kelkaj titoloj troveblaj ekzemple en CDELI:

Tekstoj

Internationale Plansprache: eine Einführung / Detlev Blanke; für die CD vorbereitet von Helmut Krone

Paco: organo de la MEM-sekcio de Germana demokrata respubliko: ĉiuj GDR-eldonoj de «Paco» 1966-1989 / CD: H. Krone

La Sentinelle: franclingvaj artikoloj 1920-1956 / Edmond Privat; redaktis: Tomasz Chmielik, Claude Gacond

La Sentinelle: franclingvaj artikoloj 1920-

1956: [index général] / Edmond Privat; redaktis: Tomasz Chmielik, Claude Gacond

(Ekzistas tri ekzempleroj de La Sentinelle, la tria prunteblas, prunkodo: ESP-P / CD 1)

Magyar-eszperantó szótár = Hungara-esperanta vortaro / Szerdahelyi István, Koutny Ilona

Kantoj, muziko

Ni ŝatus krei rubrikon en *SES informas* ankaŭ pri esperantaj kompaktdiskoj kun kantoj kaj muziko. Se vi interesiĝas pri tio kaj kapablas elekti valorajn kompaktdiskojn por prezenti ilin, ne hezitu anonci vin ĉe la redakcio.

Ĉi-jare aperis: Lida ludo, la plej belaj lidoj, arioj kaj duetoj klasikaj, fare de Ĝoja Art' kun Loretta Venturelli, soprano, Jean-Thierry von Büren, baritono, kaj Giuseppe Giusta, piano. Eldonis LF-koop, Svislando 2004.

Poemoj de C. F. Meyer tradukitaj

Conrad Ferdinand Meyer
ELEKTITAJ POEMOJ



Post traduko kaj memeldono de multaj eroj el la verko de Rudolf Steiner, Willy Nüesch dediĉis sian talenton de tradukisto al la poemoj de Conrad Ferdinand Meyer. La unuan volumon «Elektitaj poemoj» ornamas bela litografia portreto de la poeto. Same plaĉaspekta estas la dua volumo entenanta la poemciklon «La lastaj tagoj de Hutten» kun surkovrila lignogravura portreto de Ulrich von Hutten. La libroj estas aĉeteblaj ĉe Willy Nüesch, Brückfeldstrasse 11, CH-3012 Berno, au ĉe la libroservo de UEA.

Conrad Ferdinand Meyer

LA LASTAJ TAGOJ
DE HUTTEN



